

LA PROGRESO

Bohema organo esperantista ☐ **Časopis českých esperantistů**

Aperas monate. Jara obono K 4.50 (por 10 numeroj). — Redakcio: Plzeň, Radyňská ul. 10. —
Administrejo: Fr. Kavan, komercisto, Plzeň, Poděbradova tř. 6. — Konto de la Pošta ŝparkaso
no. 169.352. — Telefono: 732./VI. — La manuskriptojn oni ne resendas.

MALĜOJA DATREVENO.

La 14. de aprilo forpasis unu jaro de la momento, kiam en Varsovio lastfoje elspiris la genia aŭtoro de esperanto kaj propagandisto de la monda paco, nia Majstro Dro L. L. Zamenhof.

La 14. aprilo fariĝis por la esperantistoj tago funebra. Tiun tagon ĉiam forflugos niaj pensoj al la trankvila varsovia tombejo, en kies tero por ĉiam ripozas la korpo de la granda idealisto, kies ĉiu penado direktiĝis al atingo de daŭra, internacia paco kaj al libera vivo de la nacioj. Kontraŭ tiu ĉi martiro de sia idealo kondukis la Sorto tre kruele: la mondo ne sciis komreni tion, kion Li propagandis kaj amis per sia tuta animo. La vivo alportis al Li multajn trompiĝojn, sed Li neniam malesperis, ĉiam kun nova forto kaj obstino entreprenante batalon kontraŭ la homa malkompreno — ĝis la Sorto preparis al la de li kreita paca movado esperantista la plej grandan ironion: la mondan militon. Kaj en tiu ĉi terura milito li fine trovis daŭran pacon tie en la tero de la varsovia tombejo, kiu fariĝos Mekko de la esperantistoj.

Ni, anoj de la esperantista movado, fariĝis heredantoj de Liaj idealoj kaj ni ĉiam ŝenprofite batalos por ilia efektivigo. Kvankam ni apartenas al diversaj nacioj, ni por ĉiam restos amikoj kaj man' en mano ni laboros por egalrajto kaj amikiĝo de ĉiuj nacioj. Memorante nian karan Gvidanton, ni premas al Vi, fremdlingvaj samideanoj, Viajn manojn!

La redakcio.

EVOLUO AL LA DEMOKRACIO.

Luděk Pík, regna deputito.

Demokracio ne estas plu simpla devizo de la nuna epoko: demokracio estas idea fakto de la XX. centjaro, irante antaŭen paralele kun granda movado sociala, kiu celas kreon de nova produkta kaj sociala ordo, konforma al samtempa bezono.

Ideo de la demokracio naskiĝis samtempe kun vekigo kaj politika konscio de Eŭropaj nacioj. Ĝis al la XIX. centjaro daŭris la regado de ekstrema absolutismo. Dinastiaj familioj kaj la nobelaro estis suverena potenco, kiu regis ĉiun publikan vivojn, diktis leĝojn, arbitre ordigis land-

VÝVOJ K DEMOKRACII.

Luděk Pík, říšský poslanec.

Demokracie není již pouhým heslem současné doby: demokracie jest ideovým faktem XX. století a jde paralelně v před s velikým hnutím sociálním, směřujícím k vybudování nového výrobního a sociálního řádu; potřebě doby přiměřeného.

Myšlenka lidovlády zrodila se současně s probuzením a politickým uvědoměním národů Evropy. Až do devatenáctého století trvala vláda krajního absolutismu. Dynastické rody a šlechta byly svrchovanou mocí, která ovládala celý veřejný život, diktovala zákony, upravovala dle své zvů-

kaj ŝtatlimojn, regis al servutuloj kaj enkondukis kuratorecon por gardi pensadon, agadon kaj privatan vivon de la regnantoj. Politika servuto kompletigis servuton socialan.

La prospero de maŝina kaj industria fabrikado en la XIX. centjaro naskis novajn klasojn, novan dividon socialan kaj ankaŭ novajn ideojn. La malnova mondo de feudala kaj absolutisma regado fariĝas nekonservebla kaj la nova monda ideo naskiĝas per premeĝo de novaj sociaj rilatoj. Naskiĝas granda movado de popolamasoj, influantaj la evoluon de tutmondaj rilatoj: komenciĝas epoko de politika renaskiĝo kaj renverso, grandiĝas evoluo al demokracio kaj libereco.

La grandan movadon demokracian, kiu nun pleniĝas la tutan mondon, antaŭris vekigo de nacieca konscio. La nacioj aliĝis al sia rajto de politika kaj nacieca memstareco kaj al la rajto gvidi siajn sortojn laŭ sia volo kaj sen kuratoreco de privilegiaj subpremantoj. La principon de politika liberiĝo kaj nacia memdestino klare esprimis kaj efektiviĝis la Granda revolucio franca, kiu fariĝis antaŭgvardio de la renversa, politika kaj kultura movado de ĉiuj Eŭropaj nacioj. La revolucia franca konstitucio el la jaro 1879 proklamis la principon, ke al la nacio apartenas plena suvereneco. Per tiu ĉi principo oni forigis la privilegian potencon de nobelaro kaj de dinastiaj familioj. La nacio devas esti kreinto de la leĝoj, kiujn ĝi devas obei, la nacio devas esti iniciatinto de sia sorto, al la nacio devas esti respondaj ŝtata administrado kaj administristoj de la publikaj aferoj. La unua demokracio naskiĝis por preni lokon tie, kie antaŭe regis aristokracio.

La XX. centjaro solvas la demokracian principon jam en pli vasta amplekso. Naskiĝas sopiro de la nacioj dependantaj de fremda regado je propra ŝtata sendependeco, kiu speciale esprimiĝas ĉe la slavaj nacioj en la Eŭropa revolucio en j. 1848. Tiu ĉi celado estas jam akompanata de konkretaj ideoj demokraciaj: kiel fundamento por demokracia vivado, por moderna konstitucio kaj leĝoscienco estas proklamata postulo de ĝenerala balotrajto.

En la lastaj dekjaroj aperis potence kaj brue la ideo de la demokracio en la amasoj de laboranta popolo, kiu en sociala sklaveco sentas mankon de politika egalrajto kun aliaj klasoj de moderna kapitalista ŝtato. La nova ŝtato de la homa socio estis per la historio puŝita antaŭen

le hranice zemí a států, vládla nad poddaným lidem a zavedla poručnictví nad smýšlením, jednáním a soukromým životem občanstva. Politické nevolnictví doplňovalo poddanství sociální.

Rozmach strojní a průmyslové výroby v devatenáctém století dal vznik novým třídám, novému rozvrstvení sociálnímu a také novým myšlenkám. Starý svět feudálního a absolutistického panství stává se neudržitelným a nový světový názor tvoří se pod tlakem nového vývoje poměrů a společnosti. Vzniká veliké hnutí lidových mass, zasahujících do vývoje poměrů celého světa: nastává doba politického obrození a převratu, vývoj k demokracii a svobodě se stupňuje.

Velikému hnutí demokratickému, jež dnes zaplavuje celý svět, předcházelo probuzení národnostního uvědomění. Národové přihlásili se ku právu své politické a národnostní samostatnosti a ku právu řídití své osudy dle své vůle a bez poručnictví privilegovaných utlačovatelů. Zásadu politického osvobození a sebeurčení národů jasně vyslovila a ve skutek uvedla veliká revoluce francouzská, jež stala se předvojem v převratném, politickém a osvětovém hnutí všech národů Evropy. Revoluční ústava francouzská z r. 1879 prohlásila zásadu, že národu přísluší plná svrchovanost. Touto zásadou do prachu smetena byla výsada absolutní moci šlechty a dynastických rodů. Národ má býti tvůrcem zákonů, jímž se má podrobiti, národ má býti strůjcem svého osudu, národu mají býti zodpovědny správa státu a správcové veřejných záležitostí. První demokracie vešla v život, aby nastoupila místo, kde dříve vládla aristokracie.

Dvacáté století řeší již zásadu demokracie v širších rozměrech. Vzniká touha na cizích vládách závislých národů po vlastní státní samostatnosti, která se projevuje zejména u slovanských národů v evropské revoluci r. 1848. Toto snažení jest již provázáno konkrétními myšlenkami demokracie: za podklad pro demokratický život, pro moderní ústavu a zákonodárství vyhláší se požadavek všeobecného práva hlasovacího.

V posledních desetiletích mocně a bouřně počíná vystupovati myšlenka demokracie v massách pracujícího lidu, jež v porobě sociální postrádá politické rovnoprávnosti s ostatními stavy moderního státu

kaj ĝi tiel fariĝis portanto de la granda ideo de la demokratismo. Interrilato de la XIX. kaj de la XX. centjaro jen estas evidenta: la politika renverso estis antaŭe ago de burĝa klaso, la nunan politikan renversion al la demokracio komisiis la historio al la amasoj de laboranta popolo. Nova potenco faktoro de historio aperas, por enkonduki la veran demokracian ĝis al la tuta liberiĝo de la ĝis nun subpremataj nacioj kaj klasoj.

Ni diris: la demokracio ne estas devizo, sed fakto de XX. centjaro. Ĝia enhavo estas vasta kaj la celo nobla: la demokracio signifas efektiviĝon de memdestino kaj fratiĝo de la nacioj, ĝi signifas malobligon de la militoj, falon de nacia ŝovinismo kaj de nacieca superregado. La demokracio ne signifas brutalan regadon de amasoj kiel certigas ĝiaj malamlikoj, disciplinita demokracio signifas liberecon kaj protektadon de libereco de aliaj personoj. La demokracio estas ordo kontraŭ malordo de plutokracio kaj absolutisma regado. La demokracio estas preparo kaj antaŭjuĝo de estonta nova sociala, de estonta senklasa homa socio, kies antaŭsigno estas la granda ideo fermentado kaj kies plirapidiĝo kaŭzus putradon de la nunaj ordoj, kiuj kaŭzis la nunan sangan mondmiliton. Esperantistoj, kiuj laboras sur la granda verko de la kulturo kaj por interkompreniĝo de la nacioj, povas stari sole nur en uzadrajto de la demokratisma ideo!

kapitalistického. Nový stav společnosti lidské byl dějinami posunut do popředí a stal se tak nositelem veliké idey demokracie. Souvislost devatenáctého a dvacátého století jest tu zjevnou: dříve politický převrat byl dílem stavu občanského a dnes politický převrat k demokracii svěřen dějinami massám pracujícího lidu. Nový mocenský činitel dějin vystupuje, aby provedl skutečnou demokracii až k úplnému osvobození dosud potlačených národů a tříd.

Pravili jsme: demokracie není heslem, nýbrž faktem XX. století. Její obsah je široký a účel ušlechtilý: demokracie znamená provedení sebeurčení a sbratření národů, znamená znemožnění válek, pád nacionálního šovinismu a národnostní nadvlády. Demokracie neznamená brutální vládu mass, jak její odpůrcové tvrdí; disciplinová demokracie znamená s v o b o d u a š e t ř e n í s v o b o d y d r u h ý c h. Demokracie jest pořádek proti zlořádu vlády plutokracie a absolutismu. Demokracie jest přípravou a předpokladem budoucího nového řádu sociálního, budoucí beztrždní společnosti lidské, jejíž předzvěstí jest veliký kvas myšlenkový a jejíž urychlení způsobuje rozklad dnešních řádů, jichž dílem jest krvavá válka světová. Esperantisté, kteří pracují na velikém díle kultury a dorozumění národů, mohou státi jedině ve služebnosti myšlenky demokracie!

Dro. Stanislav Schulhof:

LINGVA FELIETONO.

La unuan, respektive la duan numeron de nia nova gazeto La Progreso mi tralegis efektive de komenco ĝis fino, kaj nun mi povas malkaŝi, kio, aŭ kiu artikolo al mi plej multe plaĉis kaj min interesis. La gustoj de la homoj estas diversaj, do ne miru, se mi diros, ke plej multe min interesis la du linioj sub la titolo: Aperas monate k. t. p., sekve artikolo, kiun multaj el vi eĉ ne rimarkis. La du linioj min tiom ekinteresis, ke mi eĉ ne povis dormi; tutan, vere senfinan nokton min persekutis la du vortoj »redakcio« kaj »administrejo«, tute ne pro tio, ĉar mi estas iel sciivola, kio nun en ili okazas, ho ne, sed tial, ĉar mi ne povis diveni, kial oni jen uzas la vorton redakcio kaj ne redaktejo, dume oni uzis administrejo, sed ne administracio.

Simila lingva fineso estas por ordinara, bone dormanta esperantisto afero tute seninteresa, sed por mi, kiu pro ĝi la tutan

nokton sin ĵetadis de unu flanko sur la alian ĝi estas tre grava kaj pro tio mi tuj post la tagiĝo prenis miajn vortarojn kaj gramatikojn por lumigi mian laciĝintan cerbon.

Laŭ la lingvaj respondoj de Zamenhof oni uzas en esperanto tre ofte du formojn por unu sola vorto, formon internacian, (administracio) kaj formon regule esperantan (administrejo). Ambaŭ formoj estas bonaj, sed Zamenhof opinias, ke eble en postaj tempoj la bone kaj regule esperantaj formoj elpuŝos la formojn internaciajn, tute simile, kiel okazas en lingvoj naciaj, kiuj ankaŭ nun konsekvente forigas ĉiujn vortojn fremdajn. Mi ne konsentas en tiu ĉi senco kun Dro. Zamenhof. En la lingvoj naciaj la puriga proceso estas tute natura, dume ĝi en esperanto signifus, ke la lingvo hontas pro sia deveno. Sed ankaŭ pro alia argumento mi ne konsilus elpuŝi el nia lingvo la formojn internaciajn, ĉar ofte ili havas iom alian enhavon, kompare kun iliaj formoj regule esperantaj.

Xaver Kučera:

EN NOVAN VIVON!

Preskau post kvarjara silento ni povas denove saluti Esperantan gazeton.

En normala tempo ni salutus ĝin sole kiel nova gazeton, sed hodiaŭ ni salutas ĝin kiel rimedo por unuiĝo de Bohemaj Esperantistoj.

Neniam ekzistis tiel favora momento por kunfratiĝo de Esperantistoj, kiel nun. Tuta nacio batalas por sia estonteco, ĉiu homo sen atento pri sia politika konvinko staras forte en vicoj kontraŭ sia malamiko.

Dro. Kramář post sia liberiĝo el malliberejo skribis:

»... Kiam ni kunvenis kun J. S. Machar, ni, kiuj antaŭe 15. jarojn nek salutis unu la alian, ni, kiuj kontraŭstaris en plej akra persona malamo, ni sen hezito premis niajn manojn kaj sentis, ke falis tuta mondo de antaŭjuĝoj, kiuj nin tiel longe partigis. Ni eksentis, ke ni estas nun kunigitaj por ĉiam — — —«.

Do, karaj samideanoj, mi esperas, ke ĉiu el vi forgesis jam vian malamikecon kontraŭ alia, ke ĉiu el vi aliĝos al centra organizacio, ke unu najbare de alia iros kune antaŭen, kontraŭ nia komuna malamiko.

Mi scias bonege, ke ne estas facile forviŝi la pasintecon, sed ni ĝin forviŝi **devas!** Alie estas la komuna laboro tute neeble!

Nia kara poeto J. S. Machar skribis

Se ekzemple mi foje subite vizitos niajn viglajn esperantistojn en Plzeň, tiam min certe ne interesos la redaktejo kaj la administrado, ĉar ili ambaŭ laŭ mia lingva instinkto estas nur ejoj, ĉambroj kun diversaj tabloj, ŝrankoj, skribmaŝinoj k. t. p. eble eĉ nur ĉambroj sen iu ajn meblo.

Sed similajn senenhavajn ĉambrojn mi vidis jam senfine multfoje, kaj se mi veturos hodiaŭ (la veturo ne estas hodiaŭ tiel agrabla) al Plzeň, tiam mi volas vidi ankaŭ sinjorojn B. Tittl kaj Fr. Kavan, sekve ne ĉambrojn, sed redakcion kaj administracion.

Sed ankaŭ laŭ mia lingva instinkto sinjoro B. Tittl plus la ĉambro ne egalas tute la vorton redakcio; pensante pri la vorto, mi ĉiam prezentas al mi ĉambron au ĉambrojn, en kiu svarmas diversaj homoj, skribantaj, diskutantaj kaj vive gestikulantaj, kaj fine mi ne povas al mi imagi la redakcion kaj ankaŭ administracion sen belaj fraŭlinoj, sidantaj kaj ridetantaj ĉe enuigaj skribmaŝinoj.

»... Milito devis alveni, milito plej terura, kiun ekvidis jarcentoj, por ke en niaj kapoj heliĝu. Militjuĝo kuracigis Dron Kramář kaj Rašín, redonis ilin tute al nacio. Vieno faris ĉe ni dum la milito ĉion, por kio mi 25. jarojn batalis.

Tiuj ĉi linioj ne estas ŝtono, ĵetita kontraŭ la mortinta estonteco — ne — sed ŝtonego, kiu estas alruligita sur ĝia tombo, por havi certecon, ke ĝi jam neniam eliros! — — —«.

Do, karaj amikoj, forgesu ĉiu el vi la estintecon, alruligu sur ĝin ŝtonegon —. Forgesu, laboru ĉiu por nia kara ideo kaj la venko estos nia.

Mi, kiel membro de B. U. E. premas manon al ĉiu t. n. »malamiko«, esperante, ke same faros ĉiu bona Esperantisto!

Se tiu ĉi ideo efektiviĝos (kaj pri tio mi tute ne dubas), ni plej bone honorigos la senmortan memoron de nia kara majstro, kiu tiel deziregis pacon inter la bohemiaj Esperantistoj. — —

Julie Šupichová:

PAROLU ESPERANTE!

Nia mortinta Majstro en sia parolado dum la Unua universala kongreso esperantista en Boulogne-sur-Mer diris: »Estas vero, ke multaj el ni posedas nian lingvon ankoraŭ tre malbone kaj malfacile balbutas, anstataŭ paroli flue; sed komparante ilian balbutadon kun la perfekte flua parolado de aliaj personoj, ĉiu konsciencia observanto facile rimarkos, ke la kaŭzo

Jen dua vorto, kiu min hodiaŭ nokte turmentis: Kial uzis Dro. Zamenhof por junaj kaj eble eĉ ne junaj virinoj la vorton fraŭlinoj, se oni ne uzas la vorton fraŭlo por viroj? Laŭ la vortaro de Kabe estas fraŭlo viro senedzina, kaj simile fraŭlino virino senedza, sed ĉu mi povas scii, ĉu ĉi tiu bela fraŭlino — pardonu virino, havas edzon aŭ ne havas? Tio ĉi estas afero, kiu nur ŝin interesas kaj por mi ŝi estas simple bela virino, respektive »sinjorino«. Ŝajnas al mi, ke Zamenhof estis tute iom partia rilate la virinan sekson. Se ekzemple vi volas al vi imagi Jozefinon, vi devas preni Jozefon, almeti al li la sufikson — in — kaj nur tiam vi havos Jozefinon. Simile el patro vi faras patrinon, el piano pianinon, el viro virinon — jen ĝi estas!

Zamenhof versimile legis la Malnovan Testamenton, kaj tie oni efektive trovas, ke Dio foje, ne havante alian pli utilan okupon faris el viro virinon. Tie estas skribite: »Tial endormigis la Ĉiopova Dio

de la balbutado kuŝas ne en la lingvo, sed nur en la nesufiĉa ekzerciteco de la diritaj personoj...«

Estas jam tia rezultato de niaj kursoj, ke iliaj partoprenantoj ne sufiĉe bone posedas nian lingvon kaj tiel tre ofte pruvus al nekredema publiko, ke Esperanto estas aŭ ia ludilo, utopio aŭ lingvo tiom malfacila, ke oni perdas la kuraĝon lerni ĝin.

Sed la kaŭzo de tiu ĉi malbona stato estas evidenta. Kiu instruas en niaj kursoj? Ĉu la kursgvidantoj (instruantoj aŭ instruistoj) estas plene kapablaj? Ĉu ili mem perfekte scias esperante paroli?

Ŝajnas al mi, ke por nia nova laboro, kiu nun komenciĝas, por la nova kampo, kiun ni post longa ripozo, volas fosi, estus necesaj bonaj, taŭgas semistoj — —. Ĉu ne estus eble renovigi la utilan agadon de iamaj »ekzamenaj komisioj?« Sufiĉus certe nur unu, kiu plenrajte estus juĝonta kaj kritikonta la kandidatojn plej severe!

Same oni ne dubos pri tio, ke eĉ la efikoj de nia laboro dependas de la praktika kaj flua uzado de esperanta lingvo, ĉar ĉiu homo prave povas postuli, ke ni sciu uzi Esperanton por kaj en kiu-ajn okazo. Eĉ se ni volas, ke la novaj adeptoj firme aliĝu al nia movado, ni devas montri al ili, ke Esperanto, kiel praktika komunikilo, estas uzebla ne nur en buŝa aŭ skriba interparoladoj (kiuj kelkafoje celas nur amuzon), sed ke ĝi plene kontentigos ilin en la bezono de komercaj, industriaj, sciencaj kaj similaj rilatoj.

Kiamaniere ni almenaŭ nun, kiam la limoj estas fermitaj, montros la neelĉerpeblan kapablecon de Esperanto? Nur tiam, kiam ni ĝin uzos kaj la homoj ekkonos,

Adamon kaj kiam li dormis, li elprenis unu el liaj ripoj kaj el ĉi tiu ripo li formis lian edzinon.« Tio ĉi estas laŭ mia opinio neeble. Se oni volas al iu elpreni la ripon, oni ĝin devas eltranĉi; oni nepre bezonas tranĉilon. Sekve la Ĉiopova devis nepre posedi tranĉilon kaj ĉar la tranĉilo ne estas pensebla sen tranĉilisto, tial la tranĉilisto devis esti pli frue ol Adamo. Tio ĉi estas simple logika pensmaniero kaj oni ne devas miri, ke pensante pri tranĉiloj mi pensis fine pri la urbo Solingen en Germanujo. Ho, kia ideo! Eble la unua homo estis iu tranĉilisto en Solingen, eble la paradizo kuŝis ie ĉe la belega rivero Rheino, eble la unua homo estis Germano — — —.

Kia feliĉo, ke La Progreso ne aperas ankoraŭ ĉiutage! Mi certe ree ne povus ekdormi, kaj morgaŭ mi devus skribi kaj vi legi similan sensecaĵon, kiel estas la ĵus skribita.

ke Esperanto estas jam de longe lingvo vivanta, ĉar ĝi vivas ĉie, ĉie, kie oni per ĝi parolas, skribas, paroladas, kantas, verkas, predikas kaj preĝas!

Tial estu nia ĉefa devo uzi la lingvon kiel eble plej multe, ĉie kaj ĉiam!

Estas malĝoja fakto, ke en niaj esperantistaj kunvenoj oni plej parte aŭdas la gepatran lingvon. La interesulo-neesperantisto alvenanta en niajn kunvenojn, certe opinias, ke li inter ni aŭdos nur esperantajn parolojn kaj dume ni montras al li, ke nia lingvo estas aŭ neparolebla kaj malfacila, aŭ ke ni ne ŝatas ĝin uzadi... .

Tamen eĉ vi, kiuj nur komencis konversacii en Esperanto, ne timu paroli, ĉar estas necese, ke vi kuraĝe parolu kaj certe neniu mokos vin, se via parolo ne estos perfekta. Per ofta uzado vi tute ne atendite akiros la necesan fluecon kaj foje alktimigiĝinte, vi ne ŝanceliĝos, kiam iu fremda vin alparolos.

Pripensu ĉiuj, kiuj celas bonan uzadon de Esperanto ke krom semajnaj kunvenoj, en kiuj efektive estas Esperanto parolata kaj aŭdata, nenio donas al ni en nuna tempo la okazon aŭdi kaj paroli la esperantan lingvon. La memlernantoj, kiuj sentas mankon de tia okazo, plej bone provas, ke la sola legado, kvankam ĝi multe helpas, ne plene sufiĉas por akiro de la flua parolmaniero.

Do: ni lernu kaj parolu esperante!

RIPROĈOJ.

En longa vico da favoraj juĝoj pri La Progreso, kiujn ricevis nia redakcio, troviĝas ankaŭ tri leteroj, en kiuj iliaj skribintoj riproĉas al ni nian vidpunkton pri la naciaj demandoj. Tri samideanoj konsilas al ni forsilasi nian naciecon en la esperantista vivado — — sekve silentigi nian koron, kiu ankaŭ en niaj brustoj batas por nia malfeliĉa patrujo.

Samideanoj, amikoj karaj, profundiĝu en pensojn kaj prezentu al Vi precize la epokon en kiu ni vivas. La nacia malamo, kiu nun batalas sur la frontoj en sangaj riveroj, levis la nacian memfidon kaj pligrandigis la amon al la patrujo. La patrujamo kaŭzis ĉe ĉiu nacio, granda eĉ malgranda, postulon de absoluta sendependeco. Neniu nacio volas esti en estonteco regata de alia nacio. Ni, esperantistoj, heredantoj de Zamenhofaj ideoj, konfesas, eĉ devas konfesi, ke similaj postuloj estas tute justaj: ĉu Franco aŭ Anglo povas kompreni la nacian karakteron de Germano, ĉu Ruso povas kompreni la naciajn bezonojn kaj sopirojn de Polo? — — — Duonpatrino estas duonpatrino — — —.

Ni, kiel esperantistoj, volas klopodi por efektiviĝo de ideoj Zamenhofaj. Ĉu estas peko, ke ni, kiel Bohemoj, havas la samajn sopirojn, kiel nia tuta nacio, ĉu estas peko, ke ankaŭ por nia nacio ni postulas justecon?

Kiel homoj ni deziras forigon de klasaj kaj sociaj diferencoj, kiel esperantistoj ni laboras por internacia amikeco kaj kompreniĝo, kiel Bohemoj ni klopodas por naciaj egalrajtoj kaj memdestino. Kiel esperantistoj ni estas internaciaj, ni estimas kaj ŝatas membrojn de kiu ajn nacio, kaj ni sincere deziras, ke ĉiu ajn nacio estu nia amiko. Kiel Bohemoj ni estas naciaj, laborante kun la tuta bohema popolo por akceli la plenumon de ĝiaj justaj postuloj kaj sopiroj. Ĉu vi miras, niaj fremdlingvaj amikoj, ke eĉ en La Progreso estas videbla rebrilo de niaj naciaj sopiroj?

Amikoj, samideanoj, ne riproĉu al nian naciecon, pardonu niajn sopirojn, sopirojn de kultura negranda nacio, kiu sincere deziras internacian fratiĝon kaj liberecon de la nacioj! Diversnacieco ne povas kaŭzi malpacon inter ni, tial ni nur ĉiam restu amikoj! B. Tittl.

F. A. Novák:

LA LABORISTO DE LA MODERNA EPOKO.

La situacio de la nuna laboristo multe diferenciĝas de la situacio, en kiu li vivis antaŭ kelkaj dekjaroj. Tiam li konis nur sian metion, liaj pensoj estis nur en la laborejo en kiu li laboris de suneliro ĝis malfruj horoj vesperaj, nepovante eĉ alie zorgi pri sia familio.

Sed la stato de la laboristo sin ŝanĝis laŭ la politikaj, socialaj kaj ekonomiaj rilatoj, kiuj naskiĝis dum la lastaj dekjaroj. Eĉ nun estas la laboristo submetita al influo de subpremo, sed li jam rimarkas ĉion kaj pensas pri ĉio, kio okazas apud li. Eĉ tie ĉi faris la eterna leĝo de evolugo nenium escepton, eĉ tie ĉi estas videbla Spirito de la Epoko. La moderna laboristo etendas la manojn al ĉiuj kulturaj akiraĵoj de la homa spirito, li ne estas jam la simpla laboristo, sed li estas solvanto kaj realisto de la Ideo.

Laŭ tio, kiajn laboristojn la fabriko okupas, laŭ tio ĝi ankaŭ povas konkuri per siaj produktoj. Tio ĉi estas konsiderinda precipe nun, kiam estas eble, ke post la nuna sanga milito okazos milito nova, milito ekonom-industria. Estas necese, ke la laboristaro troviĝu sur ankoraŭ pli alta ŝtupo de la inteligenteco. Postuloj de nia laboristaro estas konsiderindaj tiom

pli, ĉar la socia situacio de la okcidenta laboristo: angla, franca kaj usona, estas multe pli favora, ol tiu de laboristo nia. En Anglujo apenaŭ oni komencas konstrui iun fabrikan, jam oni ankaŭ konstruas familiajn domojn por la laboristoj kaj oficistoj. Tie ĉi oni ankaŭ konstruas publikajn domojn, en kiuj paroladas inĝenieroj al la laboristoj pri ilia fako Kompreneble simila laboristaro estas unuaklasa kaj sekve oni povas per ĝiaj fabrikoj bone konkuri en tutmonda vendejo.

La moderna generacio de nia laboristaro estas jam alia, ĝia penado al kleriĝo estas multe pli granda kompare kun ĝiaj antaŭuloj. Ĝi ne flankiĝas plu la burĝajn rondojn, kontraŭe ĝi penas rilatiĝi kun burĝaj inteligentuloj por sin suprenlevi kaj tiamaniere havi influon je sia socia situacio. Ĉiu laborista modernulo etendas la manojn al ĉiu kultura akiraĵo de sia tempo, li evitas nenion, kio lin povas anime kaj morale levi.

Unu el ĉi tiuj kulturigaj helpiloj estas internacia rilato per helpo de internacia lingvo. La internacia lingvo ebligas al laboristo rilaton kun malproksima lando eĉ kun diverslingve parolantaj popoloj. Per ĝi la laboristo povas akiri bezonajn informojn pri la ordinara vivo; eĉ pri la laborokondiĉoj kaj se li volas en fremdlando perfektigi, li tie ĉiam trovas amikojn, kiuj volonte helpas per sia konsilo.

Penado paroli internacian lingvon kreskas ĉiam pli, precipe inter la juna generacio. Nur en Plzeň aranĝis la Laboristaj esperantistoj en la lastaj du jaroj kvin kursojn kun preskaŭ 150 lernantoj. Eĉ en la pafistaj fosaĵoj lernas soldatoj esperanton, al kiuj niaj laboristaj esperantistoj sendis la necesajn lernolibrojn.

La moderna laboristo progresas senĉese de ŝtupo al ŝtupo. Ankaŭ al la laboristaro apartenas peco de la estonteco. Esperanto levas la laboristaron, ĉar ĝi fariĝas necesa por delikata tono de la societo. La laboriston oni ne ŝatas plu kiel aŭtomaton ne pensantan, sed kiel fundamenton de la ŝtatoj kaj de la nacioj.

Sur kiu kultura grado staras la laboristaro, tie troviĝas ankaŭ tuta nacio kaj ŝtato.

Rud. Petr:

ĤEMIA TEKNOLOGIO DE LA NUTRAĴOJ.

Ankoraŭ antaŭ ne multaj jaroj oni povis trovi eĉ en sciencaj rondoj sufiĉe da homoj, kiuj ne fidis al la Ĥemiisto konkerne la preparadon de la nutraĵoj. Lian

produkton ili nomis senvalora miksaĵo, lian arton trompado de la aĉetantoj. Tiu ĉi opinio malaperis en la tempo, kiam oni lernis ŝati la servojn de la hemio. Ĝi trovis ne nur la eblon konservi la nutraĵojn dum longa tempo en freŝa kaj manĝebla stato, sed ĝi helpis ankaŭ ilin fabriki, kaj fine ĝi trovis armilojn per kiuj estas la falsado de la nutraĵoj facile konstatebla. Dum vico da jaroj ekkonis la hemiistoj ne nur la kunmeton de diversaj nutraĵoj, sed ĉefe la celon kaj metodon de taŭga nutrado de la homa korpo.

La homa nutraĵo konsistas el tri grupoj da materioj: el organa bruligebla substanco, el neorganaj materioj, kiuj estante brulitigaj, postlasas cindron, kaj el akvo. Ĝi tiun akceptas la homa korpo ne nur en freŝiga trinkaĵo, sed eĉ en ĉiu nutraĵo. Same kiel oni devas la fornon, por doni varmon, provizi per brulaĵo, ni devas doni al nia organismo similan brulaĵon en formo de la nutraĵo. Se ni interrompas la akceptadon de la nutraĵoj dum pli longa tempo, ankaŭ tiam daŭras la oksigena procedo, sed ĝi malutilas al la korpo. En tiu ĉi okazo bruliĝas en la organismo la grasaĵo amasigita kiel rezerva materio, poste la albuminaĵoj. La korpo samtempe eldonas grandan amason da akvo. La pezo de la korpo senĉese malaltiĝas, kaj fine, kiam ĉiuj rezervoj estas elĉerpitaj — la maŝino ekhaltas. La nutraĵo servas por helpi al la organismo en ĝia movado. Se la amaso de la akceptitaj nutraĵoj precize respondas al la bezono, tiam restadas la pezo de la korpo ĉiam sen ŝanĝo, ĉar ĉiu perdo de la materio estas tuj kompensita. Se oni manĝadas pli ol estas bezone, tiam la resta parto da nutraĵoj faras rezervon en formo de graso.

Sur la bazo de granda sperto kaj post multaj provoj elkalkulis la hemiistoj la amason da nutraĵoj, kiun bezonas la homo por ne perdi la pezon de sia korpo. Homo malfacile laboranta bezonas tage 122 gramojn da albuminaĵoj, 60 gramojn da graso kaj 500 gramojn da karbonhidratoj. Kompreneble oni ne devas forgesi, ke la stomako estas granda egoisto kaj ke ĝi neniam estas kontenta kun tiu ĉi necesa nutraĵo. Ĝi deziras esti antaŭ ĉio plenigita kaj la sento de la sateco venas nur tiam, kiam oni manĝis certan amason da nutraĵoj. Sed ankaŭ tie ĉi oni trovas diferencojn: homo malfacile laboranta en la naturo bezonas por kontentigi la stomakon pli multe, ol tiu, kiu sidas dum sia laboro en la ĉambro. Ĝi tiun veron akceptis ankaŭ la milita nutraĵa komisiono por la bazo, permesante pli grandan amason da nutraĵoj al laboristo malfacile laborante ol al la oficisto, kiu korpe ne laboras. (Daŭrigo.)

SUR LA VOJO AL PLI BONA ESTONTECO.

Ni vivas nun en tempo tre malbona, kaj multaj el ni ŝanceliĝas jam sub la influo de diversaj cirkonstancoj. Tiujn ni insiste admonas, ne malesperu, kaj kun kuraĝa frunto rigardu al pli bona estonteco renkonten, ĉar ĝi apartenas al ni, kaj al nia idaro. Ni ne forgesu, ke ni vivas en komenco de nova epoko, kaj ĝi estas sole ni, kiuj destinoj nian venontan sorton. Kompreneble la homaro travivas hodiaŭ malfacilajn momentojn — momentojn plenajn je suferado kaj malĝojo, kaj devas ankoraŭ nun post la rezignacioplena, kvarjara sangoverŝado, kaj abnegacio, kun granda teruro atendi ankoraŭ momentojn multe pli malbonajn, ĉar la blindigitaj, kruelaj imperialistoj pelas la popolon al la plena elĉerpiĝo kaj pereco ekonomia.

Dume, kiam centmiloj kaj centmiloj mortas kaj sangas, dume, kiam la patrinoj edzinoj, amatinoj kaj infanoj rememoras kaj sopiras siajn patrojn, siajn plej amatajn, kiam centmiloj da mizeruloj travivas momentojn preskaŭ nekredoblajn sen ĉiuj vivrimedoj en granda malsato, — kion efektive faras la veraj instigantoj de ĉi tiu milito? —

Ĉiuj senescepte, tion ni scias tre bone, vivas vivon diboĉeman, senmoralan, kaj riĉiĝas sin por malprofito de aliuloj, precipe je konto de malsuperaj klasoj, tute egale, al kiu ajn nacio ili apartenas. En diversaj ĵurnaloj, kiujn ili aĉetas, aŭ diversmaniere gajnas por la instigado al la plua militado, malsaĝigante la popolon, kaj delogante ĝin al la neĝusta vojo, tio estas, al malamo kontraŭ alinacianoj, kun kiuj ili povus vivi en paco kaj plena harmonio — se ili volus aprobi kompreneble iliajn rajtojn. Similaj ĵurnaloj vadas ofte en homa sango, kio kaŭzas al ili, same kiel al multaj legantoj de tiaj ĵurnaloj, eksterordinaran ĝojon. Ju pli multe da mortigitaj homaj estuloj, des pli da entuziasmo kaj gloro. — Sed ili forgesas ja, ke sammaniere mortas ankau iliaj filoj kaj infanoj, kaj al tiuj certe la realaj okazintaĵoj ne estas ridindaj, — ili forgesas ankaŭ, ke la suferadon kaj la doloron sentas ĉiuj egale, ĉu amiko aŭ malamiko.

Se iam ekaŭdas tiaj »patritoj«, ke iu tuj ne entuziasme aprobas tiaspecan skribmanieron, kaj furiozadon, aŭ se li nur montras iun kompaton, kaj bedaŭron super tiom verŝita sango, oni simple proklamas lin regnoperfigulo, kaj danĝera malamiko de la ŝtato, kaj sendas al li tuj la policistaron. Omladina.

OLGA FASTROVÁ:

„VIRINO, KIU SOPIRAS SIAN EDZON, ESTAS INTERNACIA.“

Grafo Czernin (la ministro por eksterlandaj aferoj) diris la 2an de aprilo en sia memorinda parolado: »...Mi konas Bohemojn perfekte; mi scias diferencigi la bohemian nacion de ĝiaj gvidantoj. La bohemia nacio, bohemia patrino ne pensas tiel, kiel tiuj ĉi viroj. Patrino, kiu sopiras je sia filo, edzino, kiu sopiras je sia edzo, estas internacia, ŝi estas la sama en ĉiuj nacioj de la imperio, la milita mizerio fratigas ĉiujn naciojn, ĉiuj volas, ke la milito finiĝu, sed ili estas delogataj, trompataj; ili ne vidas, ke tio estas iliaj unuopaj reprezentantoj, kiuj plilongigas senhonte la militon kaj ĝiajn suferojn...«

Grafo Czernin estas prava se li diras ke en la opinioj pri la milito estas la virinoj de ĉiuj nacioj de la imperio unuanimaj. Sed ne nur tio; ili estas la samaj en ĉiuj militantaj landoj, kaj en la tuta mondo. Ĉiuj kulturigitaj virinoj entute sentas internacie. Jam longe antaŭ la milito oni povis tion observi; oni aranĝis ja la feministajn kongresojn internaciajn, en kiuj estis akcentate ĉiam sole tio, kio la naciojn kunigas, kaj ne tio, kio ilin disigas. Ĉiu nobla virino sentas internacie, tio signifas: en ŝia koro ne estas loko por sovaĝa, kaj kruela malamo kontraŭ aliaj nacioj. En ĉiuj feministaj gazetoj, aperu ĝi en kiu — ajn lingvo, neniam estis presitaj la vortoj de blinda, furioza malamo kontraŭ alia nacio. Similajn vortojn ni legis eĉ ne en germanaj gazetoj por la virinoj en la plej unua fazo de la nuna milito. La virino timegas la sangverŝadon; la virino malamas la militojn, kiuj tiom da suferoj, kaj doloroj alportadas. La virino dezirus, ke ĉiuj homoj ĉirkaŭ ŝi povu vivi kontente, diligente labori, kaj ĝoji je fruktoj de sia laboro. Ŝi dezirus tion ne sole al sia propra nacio sed al ĉiuj ceteraj nacioj. Jes, en tiu senco de la vorto ankaŭ bohemia virino sentas vere internacie.

Se tiel internacie sentus ĉiuj viroj, kaj precipe tiuj, kiuj havas arbitracian influon je la destino de la nacioj, la milito ne povus eĉ naskiĝi. Sed la viroj ne sentas internacie; ili amas sole sian potencon, grandecon, kaj gloron, kaj la ceteraj nacioj ne ekzistas tute por ili. Tiuj ĉi viroj vidas

grandecon kaj belecon en la persistemo, kaj ili pensas, ke estas necese, ke la kontraŭulo devige akceptu ilian opinion je ĉiu prezo. Kaj pro tio naskiĝis la milito, tial ĝi daŭras jam preskaŭ kvar jarojn.

Tiel naciece la virinoj ne opinas, tio estas vero.

Sed ekzistas ankoraŭ alia amo al la nacio, ol tiu, kiu el la patriotismo kreas iun utopian kaj konsternigan ideon por la devojiĝo de la monda ekvilibro. Ekzistas alia sento nacia, sento nobla kaj bela. La koro de ĝi gvidata ne deziras superregadon, kaj atakojn por la gloro kaj riĉigo de sia nacio. Sed ĝi sopiras vidi sian nacion morale puran kaj morale grandan. Kaj tial ĝi postulas ĝian memstarecon. Sklavigo ne elkulturas karakterojn. La sklavigo kondukas al mensogo kaj hipokriteco. Sole en nacio libera, kiu mem destinas al si la vojon, sur kiu ĝi volas paŝi, nur tiam prosperas bone la belaj civitanaj virtoj.

Se la grafo Czernin pensas, ke la bohemia virino ne estas kapabla posedi tiun belan nacian virton, tiam li eraras. Ĉiuj bohemiaj virinoj senescepte arde kaj el la fundo de sia koro sopiras je memstareco de sia nacio, de kiu ili atendas ĝian moralan renaskiĝon, kaj purigon, kaj en tiu sopiro ili estas unuanimaj kun la bohemiaj viroj, kaj la bohemiaj gvidantoj.

El Národní Politika.

Ant. Janalíková:

MIA MALLIBERIGO

en la jaro 1915.

I.

Malpeza pordo fermiĝis kun granda bruo, ŝlosilo ekkrakis kaj fortaj rigliloj enfalis. La okuloj nur malfacile kutimiĝas al duonlumo, kiu penetras ĉi tien tra du forte kradfermitaj fenestroj kun netravid-ebla vitro. Malagrabla malodoro de polvo, malsekeco, haladzo kaj fekaĵo de homaj korpoj plenigas sufiĉe grandan ĉambron. Sur la planko kuŝas naŭ pajlsakoj, sur kiuj kuntiriĝas virinaj korpoj, kovritaj per lankovrilo; kvar pajlsakoj estas ankoraŭ en rezervo.

Mia alveno vekis kelkajn dormantinojn kaj kiel la malheleco tion nur permesis, ili min komencis observi. Estis jam la dek unua horo. Tremante pro malvarmo kaj ekscito kaŭzita de la laste travivitaj momentoj, mi staris senkonsile apud la pordo.

Kelkaj voĉoj bonvenis min per demando, kiu kaj de kie mi estas kaj kial mi alvenis ĉi tien. Kaj kompleze, preskaŭ ĉiuj samtempe rakontas kelkaj el ili, ke oni ilin ĉi tie nomas »soldatoj« por ilin diferencigi de la aliaj »simplaj« arestitoj — ili ion diris pri la imperiestra moŝto. Kun la sama komplezo leviĝis du el ili, deprenis unu el la kvar pajlsakoj, metis ĝin teren kaj kovris ĝin per lit — kaj lankovrilo.

Malmola kaj malvarma lito! Mi envolviĝis en grandan lanan tukon, kiun solan el ĉiuj miaj objektoj oni permesis al mi kunporti kaj provis ekdormi. Vana peno! Miloĵ da pensoj trakuras mian kapon: En tre strangaj cirkonstancoj mi travivis Paskon — la reviviĝon de la naturo. Dimanĉe, mallonge post la tagmezo venis soldata serĝento al mi kaj antaŭ ol mi povis rekonsciigi el mia ekmirego, — la vagonaro jam forportis min de miaj belaj montoj kaj min alportis en la ĉefurbon de nia Moravio, sed nur en la lokojn, kiujn mi dum mia studado ĉiam preteriradis kun timo kaj teruro. En miaj pensoj mi ankoraŭ sentas la senesperan ploron de mia patrino, la timigitajn vizaĝojn de miaj amikoj kaj konatoj kaj scivolajn okulojn de nekonataj personoj, kiuj min renkontis kun mia stranga kondukanto.

El la stacidomo ni venis per veturilo ĝis al la malliberejo, troviĝanta en strato Cejl, kie oni min akceptis kun ironiaj rimarkoj. La inspektistino min serĉesploris tre severe, ŝi forprenis kaj registris ĉiujn miajn objektojn kaj kondukis min tra longaj koridoroj en la ĉambron nro. 47. Ĝis nun mi aŭdas ŝiajn raŭkajn vortojn: Demetu vestaĵon!, kiujn ŝi kolere ripetis, kiam mi kuraĝis rimarki, ke tie estas tre malvarme. — Tiu malvarmo tremigas min ankoraŭ nun, kvankam la kapo bruldoloras. Minuto malrapide sekvas minuton, el la korto oni povas aŭdi laŭtan sonoradon de horloĝo. Post ĉiu finbato aŭdiĝas bruo de ŝlosiloj kaj sur la korto eĉ en la koridoroj barelsonas paŝoj de inspektistoj. Oni malfermas malgrandan fenestreton en la pordo de ĉiu ĉelo kaj la esloremaĵojn okuloj observas la staton en la ĉambro. Oni povas aŭdi la spiradon de sur la pajlsakoj, de aliaj eĉ ronkadon kaj parolojn el sonĝo. La pensoj en la kapo fulmorapide kuras. Kion oni faras hejme? Mi scias, ke la lastaj okazintaĵoj forpelis por longa tempo la dormon de miaj karuloj kaj trankvilon de iliaj animoj. Kaj tiu ĉi scio min plej multe turmentas.

La denuncio en mia afero estis tute mensoga. Kvankam mi antaŭ la komenco de la milito persone rilatiĝis kun Rusoj, tamen

mi al ili ne vendis planojn de aŭstriaĵoj fortikaĵoj. En tiu rilato mi estas tute kvieta, la korpajn suferojn mi eble travivos —. Nur ke mia patrino ne malsaniĝu pro tio, ke ŝi ne mortu! (Mia antaŭsento efektiviĝis: antaŭ unu jaro oni ŝin enterigis.) Neniu ŝi havas, kiu ŝin povus nun, en ŝia maljuneco subteni. Kaj tio estas jam dua terura okazintaĵo dum la lastaj monatoj. La milito nin trafis en »malamika« Parizo, kien ni venis por ĉeesti esperantan kongreson. Dum 10 semajnoj oni nenion aŭdis pri ni. Mi supozas kiom da timo ŝi jam tiam travivis — kaj nun ĉi tiu afero!

Kial mi estas ĉi tie? Per kio mi estas kulpa? Mi ja ne povas kompreni, ke vojaĝado kaj lernado de fremdaj lingvoj estas punindaj. Ke krom esperanto ĝi estas rusa, angla kaj franca lingvoj? Antaŭ la milito estis la rilatoj inter ĉiuj nacioj la plej bonaj. Lernante lingvojn mi rilatiĝis kun membroj de rilataj nacioj — tio ja estas klara. La esploranta juĝisto mem tion komprenis dum la ekzamenado, ke oni povas ellerni lingvon nur per interparolado, kaj ke la rusan lingvon oni ne povas ellerni parolante kun Germano estas natura kaj klara. Ke oni el ĉi tio povu krei ŝtatperfidajn intrigojn, kiel en mia dokumento estas skribite, por tio oni bezonas bonan noblimuman personon, mian ĉeĥan koleginon, kiu amuzas influajn germanajn familiojn — dum ĉi tiu danĝera tempo — per la aferoj de siaj ĉeĥaj koleginoj, bone sciante, ke ŝi ne parolas veron. — Sed ĉi tiuj familioj estas riĉaj! Ili scias regali kaj sendi belajn donacojn! — — Bedaŭrinde ĉiu nacio posedas similajn personojn!

Post la detala soldata dominspekto, dum kiu oni konfiskis krom la alia ĉefe la esperantan korespondadon, fremdlingvaj vortarojn kaj vojaĝajn notlibrojn, oni faris detalan protokolon, venigis multe da atestantoj kaj en la paska dimanĉo oni min forkondukis malliberejon. (Daŭrigo.)

Karel Havlíček (21./2. 1856).

KONSILO AL MALSAGA JOĈJO.

»Post tagmanĝo, Joĉjo«,
Diris patrineto,
Ne leku, sed viŝu
Lipojn per tuketo.«

»Sed post kiso, aŭdu —
Alia konsilo:
Pli bone ol viŝi
Leku lipojn, filo.«

trad. Fraha.

Dro. Stanislav Schulhof:

SOVAĜA KANTO.

Foje en aŭtuno, kiam birda aro
sin pretigis flugi ien trans la maro,
kiam en la parko velkis lasta flor',
tiam ankaŭ mia kanto bela, juna
eksopiris je la lando varma, suna
kaj kun birda svarmo flugis de mi for.

La printempo venis en sekvinta jaro
kaj de sud' kun birda petolema aro
venis ankaŭ mia forfluginta kant';
mi ĝin kompreneble logis, kapti penis,
sed la sovaĝulo min jam ne komprenis
kaj sin al mi kaŝis ie en lekant'.

Tial, se vi kanton mian koni volas
serĉu en natur ĝin, kie vivo bolas,
sed ne en la libroj, ie sur paper';
inter papilioj, muŝoj, floroj ĉarmaj,
sur herbejo verda, en radioj varmaj,
mia kant' petolas, ie sur la ter'.

Mi ne scias, kie vi ĝin serĉi devas,
kie ĝi sin kaŝas, kie nune revas,
aŭ ĉu je vi ridas ie en sekret;
eble ĝi fariĝis honodora floro
kaj ĵus hejmen portas ĝin sur juna koro
ia sopiranta, bela knabinet'.

Dr. Stanislav Schulhof (Traduko):

DIVOKÁ PÍSEŇ.

Kdysi v podzim, když už z našich niv a hájů
odlétalo ptactvo do zámořských krajů,
poslední když vадnul list již na větvích,
tenkrát také moje píseň mladá, milá,
po krajinách jiných, cizích zatoužila
a odlétla s ptáky v teplý, slunný jih.

Když však s novým jarem v naše sady, nivy
navrátil se ptačí národ skotačivý,
přilétla též píseň moje najednou;
lákal jsem ji ovšem, chytit chtěl ji zase,
ale zdivočila v kratičkém tom čase
a se v trávě skryla někde přede mnou.

Pročez moji píseň poznati-li chcete,
ven a v teplý život do přírody jděte,
nehledejte však ji nikde ve knihách;
mezi ptáky, květy, v šumném mušek rejí,
v slunci, v trávě někde je teď úkryt její,
skotačí však někde v hustých křovinách.

Nevím sám, kde teď by k nalezení byla,
kde teď sní, či kde se zrakům vašim
skryla,
možno, že i odkuds směje se vám v líc;
možno, že i v květ se proměnila v lese,
který na svém srdci mladém právě nese
domů hezká dívka, láskou vzdychajíc.

Kolonelo Franz Zwach (Traduko):

DAS SCHEUE LIED.

Einst im kühlen Herbste als die Vogelscharen
über's Meer zu fliegen im Begriffe waren,
als im Garten schon die letzte Blüte schwand,
ist auch mein klein Liedchen, von der Luft gezogen
mit den Wandervögeln südwerts fortgeflogen,
weit von mir in's warm, sonnebeglänzte Land.

Und im nächsten Frühling, als die nimmermüden,
bunten Sänger kamen aus dem fernen Süden,
kam auch mein verflogenes Liedchen heimatfroh;
wollts mit Schmeicheln, Locken gerne wiederfangen,
doch der Wildling ist mir nicht drauf eingegangen
und verbarg sich unter Blüten irgendwo.

Darum wollt ihrs wissen, wo mein Liedchen weilet,
sucht in der Natur, dort, wo das Leben eilet,
aber nicht in Büchern, nicht auf Druckpapier;
zwischen Blüten, Käfern, bunten Schmetterlingen,
auf der grünen Wiese hört mein Lied ihr klingen,
lustig in die Welt hinaus, bald dort, bald hier.

Wo ihrs suchen musst, ob in den tiefen Schründen,
wo es träumt und sinnt, ich weiss es nicht zu künden,
oder lacht es euer gar in Heimlichkeit?
Möglich, dass zur Blume ward dies junge Leben,
und auf ihrem Herzen trägt es heim soeben
voller Sehnsucht eine wunderholde Maid.

(Tiu ĉi poemo estis tradukita ankaŭ en polan kaj francan lingvojn.)

J. S. MACHAR:

MARIA TEREZIA ORDENÓ.

(Daurigo.)

Machan revenis al la kompanio:

»Knaboj, ĉu vi vidas tie la maljunan generalon! Li estas kavaleristo, kiam vi lin preteriros, montru al li, kiel scias marŝi la pafistoj. Akran tempomezuron, per piedo apenaŭ tuŝi la teron...«

La bataliono elmarŝis antaŭen. La soldatoj penis marŝi kiel eble plej elaste. Kaj la bonanima gufo kliniĝis en la selo kaj laŭte alparolis la subkolonelon:

»Ci, Šmid, cial pafistoj iras tiel bone, ke efektive vera ĝuo estas rigardi ilin! Domaĝe, ke ili ne estas ĉe kavalerio!«

Krihuber kvazaŭ freneza galopigis la ĉevalon antaŭen. Li alrajdis Machan'on. »Nu, filozofo, ĉu vi aŭdis la esprimon de l' generalo pri ni? Kaj vidis, kiel egoiste la maljuna akceptis tiun komplimenton? Jes, tiel ĝi estas, ni peneg laboras, kaj la maljuna rikoltas dankemon...«

Sur la brigadkunvenejo estis jam vigla svarmado. Du infanteri-regimentoj ĉeestis ĉi tie, kelke da kantinveturiloj kun kolbasoj, pano, biero, brando kaj cigaroj. La maljuna virinaro kun korboj sur la dorsoj iradis inter la soldatoj, kaj vendis iajn dolĉajn sukoin. Malrekte piedaj bakistoj trenis siajn grandajn korbojn kun varma, freŝbakita bakajo, de amaso, al amaso da grupiĝintaj soldatoj. Tu multo, rido, fumo el la pipoj kaj cigaroj, svarmado de nigrebluaj staturoj, en kiujn intermiksiĝis nun la grizaj uniformoj de l' pafistoj.

La sinjoroj estis grupiĝantaj ĉirkaŭ la generalo, malgrasa, nervmalsana homo, kiun la tuta brigado nomis konfuzulo.

»La malamika divizio havas okupatan Příbram kaj elsendis unu brigadon — — k. t. p. klarigis la generalo per raŭkega voĉo dishakante pluajn vortojn je du kaj tri partojn, menciante fine la ĉeeston de la marŝalo A. kaj estron de l' generalŝtabo barono B.

Eksonis korneto. La pipoj estingiĝis, cigarojn oni forĵetis, la soldatoj ekprenis siajn pafilojn kaj vicigis. La brigado dispartigis sur siajn postenojn.

Trans terulojn de freŝe plugitaj kampoj faletadis leŭtenanto Machan kaj lin sekvis la kompanio al la menciita roko.

»Knaboj, estu pli diligentaj, tie atendas vin ripozo, tie vi ekkuŝos, kaj la pafilojn ne estos necese eĉ purigi hodiaŭ, ĉar ni ne havos okazon elpafi eĉ unu patronon.«

La suno brulegis infere. Kaj nenie eĉ arbeto, kaj la tero varmegis sub la korpo kiel forno.

»Bela pozicio,« murmuris al si Machan, »Post unu horo ni estos rostitaj kiel duonangla beefsteako.«

»Sinjoro leŭtenanto, tie antaŭ ni proksimume dek minutojn da vojo estas arbaro, anoncis trumpetisto, al kiu la ŝvito ruliĝis de l' tuta vizaĝo. Li estis ununanime aprobata kiel plej granda malŝaĝulo de l' tuta kompanio.

»Eksilentu!« rebate respondis Machan.

»Tie estas arbareto, bela arbareto,« aŭdigis vorton alia pafisto.

»Diable, tie estas eble malvarmete« opiniis alia.

»Kaj tion sinjoro kapitano ne havas sur la karto, ke tie troviĝas arbaro?« iu naive demandis.

»Azeno, sur tiuspecaj kartoj ne povas esti ĉio. Ĉia bieno ankaŭ ne estas tie.«

»Li havas bienon en Nemánice* (esper.: Havasnenion).

»Ne tie, sed en Rádobymlíce** (esper.: Havajavidema).

La filozofo Machan seninterese aŭskultis tiun incitadon. Estis varmege al li. Li rigardis la direkton al la arbaro. Bela arbareto. Kvadrato da maljunaj arboj, pli ampleksaj ol la homa korpo. Kaj la herbo, kia herbo! Ĝi eĉ brilis ĉi tien. Cetere, ĉio okazos en la centro, Krihuber sin certe bone informis hieraŭ ĉe la adjutanto, eble, ke eĉ sur la kontraŭa flanko...

»Antaŭen!« Li komandis. Kaj per firma paŝo ekiris malsupren de l' roko, kaj direktis sin al la arbareto...

Malvarmeto... paradiza malvarmeto...

»Knaboj ĉiu ekoĉupu po unu arbo! ke ĉiu estu bone kaŝita!«

La pafistoj tuj kaŝiĝis. Ili trovis grandan plaĉon en tiu pozicio.

Ĉevalgalopo.

»Sinjoro leŭtenanto Machan! Sed, sinjoro leŭtenanto!« kriegis de malantaŭe kapitano Krihuber. »Kien vi estis enrampinta, vi mal-feliĉulo? Ĉu vi ne aŭdis? Mi malliberigos vin, mi malliberigos vin, al la raporto mi kondukos vin,« kaj Krihuber estis ruĝa kiel kankro.

Subite eksonis pafo kontraŭ ni — malamiko.

»Diablo vin prenu, formanĝu nun, kion vi mem estis kuirinta al vi. Mi tute ne protektos vin.«

Li ekinsultis ankoraŭ ion kaj forrajdis.

»Ekpafu!« komandis Machan. La tuta kompanio ekpafis salvon. Kaj kiam la pafo ektondris, la soldatoj kvazaŭ konsterniĝis. Grandega ĝi estis, eksterordinara kaj kelkfoje ĝi resonigis. La arbopintoj tremiĝis kaj murmurbruetis, kvazaŭ ili volus esprimi per tio sian kontentemon. Kruta roko malantaŭe, kiu devis esti la posteno de l' kompanio, resonigis la salvon tri aŭ kvarfoje.

»Ekpafu!« komandis la filozofo denove.«

Kaj la dua ektondro terura, barelsona kaj per novaj eĥoj ripetita.

»Atenton, pafu malrapide unu post la alia!«

Infera bruego! Ĉe Králové Hradec (Königgrätz) en tiu plej terura batalo ne povis esti pli granda bruego.

La malamiko konsternita eble, iris returnen.

Sed ne longe. La ĉenoj de ĝiaj linioj plifortiĝis kaj movis sin antaŭen.

*) Moknomo de l' imagvilaĝo, kies loĝantoj posedas nenian havaĵon.

***) Moknomo de l' imagvilaĝo, kies loĝantoj estas senhavaj fanfaronemuloj.

Machan rigardis trankvile la paflumentojn, la svingantajn sabrojn, kaj taksis lau nombro de l' oficioj la malamikan forton.

Dauris ne longe, kaj li havis jam antaŭ si kelke da batalionoj.

Sed la terura pafado la malamikon evidente maltrankviligis. La ĉenoj de ĝiaj linioj plifortigis, kaj plifortigis, sed ne plu movis sia antaŭen.

Du rajdantoj engalopis de malantaŭe en la arbaron.

La arĥiduko A. kun adjutanto.

»Kiu komandas ĉi tie?« demandis la marŝalo per sia alta preskaŭ sibla voĉo.

»Imperia moŝto, leutenanto Machan, de la sesa bataliono de pafistoj, unua kompanio, li prezentis sin, kiel eble plej humile.

»Bone. Ne foriru de ĉi tie, leutenanto!«

Ili forrajdis.

Novaj du rajdantoj. Barono kun adjutanto.

»Kiu komandas ĉi tie?«

Machan sin prezentis.

Tenu ĉi tiun pozicion, kaj postulu rezervon.«

Machan sendis trumpetiston al Krihuber (la trumpetisto erariris, kaj revenis vespere Pribramon).

La batalo esperplene kaj sukcese daŭris. La ĉfo laboris kiel frenezulo arbaro bruegis kaj, ĝi estis agrabla ekscitiĝo en ĝia malvarmo. La malamiko antaŭ ni kreskiĝis en grandaj amasoj, sed ne iris antaŭen.

Kaj subite Machan observis ion teruran. Ekmirego kaj konfuzo tie antaŭ ni. Trumpetado, komandoj. La linioj leviĝis kaj turniĝis kaj pafis ien.

»Jen, la niaj enfalis ĝian dorson,« pensis al si Machan. »Knaboj, lastajn patronojn en la pafilojn, kaj pafu kiel eble plej rapide.«

Dudek sputantaj pafilegoj ne povis fari pli grandan bruon...

Subita trumpetado. La batalo estis finita.

En la arbaron enfluegis Krihuber. Desaltis de l' ĉevalo, kaj ĉirkaŭprenis Machan'on. Filozofa, filozofa!« eligis el si. Kaj longe li diris nenion.

Poste li elpoŝigis cigaron. »Ĝi estas specialaĵo, prenu ĝin. Kaj ĉu vi scias, ke ni estas venkintoj: Kaj ĉu vi scias, ke ni ambaŭ havus en serioza tempo jam la ordenon de Marie Terezio certan? Ma-ri-e Te-re-zi-e!«

Machan rakontis al li pri la vizitoj de A. kaj B.

»Rigardu, kiel feliĉa vi estas! Malbenita knabego, vi faros karieron! Ni ambaŭ filozofa, ni ambaŭ! Mario — Terezio ni havus certigan — tia feliĉo filozofa, tia feliĉo! Skribu poemon pri tio.«

Kaj li rakontis: La malamiko koncentriĝis siajn fortojn kontraŭ la arbaro, pri kiu ĝi lau la pafado supozis, ke ĝi estas eksterordinare okupata, la niaj poste jetis la malfortigitan flankon returnen, premigis eĉ la centron mem, kaj atakis ĝian dorson.

Dum la returnmarŝo alrajdis, la graso ĝeneralo al Krihuber. Prezantante al li la manon, li dankis lin eksterordinare varme. Kaj precipe pro tio ke la imperiestra moŝto kaj barono B. estis mem la okulatestantoj de tiu strategia majstraĵo. En la vera batalo alportas simila okazintaĵo Mario-Terezio...

Posttagmeze invitis Krihuber sian leutenanton en vinejon. Havigis al li paron da kolbasetoj, kaj okonon da vino, pri tio ĉiuj, kiuj konis la avidan Krihuber'on konsterniĝis. Kaj longe, kaj larĝe li priskribis siajn dispoziciojn, por klarigi, ke li devis memvole agi kontraŭ la rekta ordono sciante, ke li sole per tio alkondukos la neatenditan ŝanĝon de l' tuta batalo, kaj kiel la marŝalo mem alrajdis lin, kaj diris: »Bone estas tiel!« kaj kiel barono B. diris al li: »Restu ĉi tie, kaj subtenu per la rezervo la pozicion en la arbaro.« — — Kompreneble, ke ankaŭ lia leutenanto, Machan, estas aminda homo, kiu scipovas plenumi la ordonon. Ambaŭ havus Mario-Terezio, se tio okazus en vera milito.

La bona Krihuber la saman vesperon drinkiĝis ĝis la muteco... Dekfojon li rakontis sian historion, kaj dekfojon sopirekĝemis je tempo de l' vera milito, en kiu li certe ricevis la Maria-Terezia ordenon.

Kun permeso de la aŭtoro esp.

Marie Kubásková.

JUĜOJ PRJ LA PROGRESO.

Post la apero de la 1. kajero de La Progreso ricevis nia redakcio grandan amason da juĝoj pri la enhavo de nia gazeto de multaj amikoj bohemiaj, germanaj, hungaraj, polaj kaj italaj. Por ni estas tre ĝojiga la fakto, ke La Progreso plaĉas preskaŭ al ĉiu — ni diras: preskaŭ, ĉar ni ricevis ankaŭ protestojn kontraŭ ĝia enhavo. Tri amikoj plendis pro la politikeco de La Progreso: Germano, Bohemo kaj Hungaro; unu esperantisto el Praha riproĉis al ni, ke la teksto de nia gazeto estas preskaŭ tute esperanta kaj nur malmulte bohema, kaj sep aliaj amikoj el la sama urbo atentigas nin, ke tiu aŭ alia artikolo ne meritis esti enpresita. Lau ilia opinio estas nek unu artikolo de nia unua numero senriproĉa! Kvankam estas tre interese legi ĉi tiujn kritikojn, ni ilin pro diversaj kaŭzoj ne povas enpresii.

Multaj bohemiaj ĵurnaloj kritikis nian gazeton tre favore. »Nová Doba« en Plzeň skribis: »..... 16 paĝoj da riĉa enhavo de la unua kajero atestas la veran inteligentecon de la bohema esperantistaro...« »Omladina« en Plzeň: »La Progreso estas la titolo de la bela aspekta esperanta gazeto, kiu ĵus aperis en Plzeň. Interese estas, ke tiu ĉi gazeto de bohemiaj esperantistoj estas la sola gazeto esperanta en Aŭstrio. Stile eĉ enhave ĝi estas efektive reprezentanta gazeto, kiu agrable surprizas ĉiun, eĉ nekonanton de la lingvo internacia. Ĉi tiun grandan agon de niaj esperantistoj oni devas kviti kun aprobo kaj deziri, ke ĝi trovu plej belan sukceson...« Ne mapli favore prijuĝis La Progreson »Právo Lidu« en Praha, »Český Západ« kaj »Český Kraj« en Plzeň, »Jihočeské Listy« en Čes. Budějovice k. a. Ankaŭ kelkaj fremdlingvaj gazetoj skribis pri la apero de nia gazeto.

El la personoj, kiuj nin ĝojigis per sia favora kritiko pri la enhavo de nia gazeto ni citas la nomon de la fondinto de la bohema

esperantista movado, sinjoro Theodor Ĉejka, la fama eldoninto de boh.-esp. lernolibroj kaj vortaroj. So. Ĉejka skribis: »...mi ricevis la 1. kajeron de La Progreso, kies aperon mi kore salutas, ne nur pro ĝia intenco kunigi denove la boheman esperantistaron, sed ankaŭ pro ĝia simpatia enhavo, kiu vere respondas al la devizo »La Progreso«. La enhavo de nia nova gazeto respondas al la progreso ankaŭ en tiu rilato, ke ĝi evitas demandojn pure lingvajn. Mi esperas, ke la nova tempo montras al esperantistoj la veran celon de lingvo internacia, kiu certe ne troviĝas en infanaj ludoj kun diversaj vortetoj kaj gramatikaj reguletoj... Esperanto donis jam sufiĉan pruvon, ke ĝi ekzistas kaj taŭgas por ludi la rolon de la lingvo internacia, tial ni uzu ĝin por la vivo! Mi sentas, ke Via programo bone komprenas la nunan tempon kaj tial mi deziras al ĝi kore la plej bonan sukceson. Via Th. Ĉejka.«

Ke ankaŭ niaj germanaj amikoj ĝoje bonvenis la aperon de nia gazeto atestas jena letero: »... Jam de longe mi atendis La Progreson, tial Vi povas imagi mian ĝojon ekvidante la gazeton superigantan mian supozon, ne nur koncerne de ĝia bela esperanto kaj formo, sed precipe de ĝia eminenta teksto. Niaj karaj bohemaj samideanoj posedas nun fakte bonegan ligilon, kaj la ĝojo, kiun ili eksentas ĉe la ekvido de ilia nova organo, estas ankaŭ nia ĝojo. »Progreso« progresigu la idealon de nia kara Majstro Dro. Zamenhof kaj laboru fruktriĉe por la homaro ĝenerale kaj por la bono de bohema nacio speciale. La Progreso vivu, kresku kaj floru! Altestime A. F. Müller, Wien.«

Ni ĝojos, se niaj ĝisnunaj amikoj subtenos nin en la peno plenumi nian ne tute facilan taskojn kaj se niaj kritikemuloj montros per La Progreso sian animan potencon.

❁	DIVERSAĴOJ.	❁
---	--------------------	---

Atentigo! La presado de La Progreso en Praha kaŭzis al ni vicon da malagrablaĵoj, inter kiuj estas speciale citinda la multo da preseraroj, kiujn ni eĉ per plej zorga korekto ne povis forigi kaj tial ni preferis atendi ĝis nia definitiva presejo en Plzeň estos kapabla maŝine komposti La Progreson. Ankaŭ longedaŭraj gravaj instalaĵoj faritaj en nia presejo malfruigis la aperon de tiu ĉi kajero. Kvankam nia redakcio eĉ administracio ĉiuforte penis plirapidigi la aperon de tiu ĉi kajero, oni ne povis eviti novan malfruigon. La 5.—6. numero de nia gazeto aperos fine de junio kaj tiam estos ankaŭ forigita la data diferenco en ĝia aperado. Niaj kunlaborantoj kaj raportistoj bonvolu sendi siajn artikolojn plej malfrue la 25. de t. m.

Esperanto helpas! Puvon de praktika uzo de esperanto en la komerco

prezentas kelkaj firmoj en Plzeň: La urba elektrejo en Plzeň, kies direktoro so. ĉefing. Novák estas fervora esperantisto, dissendis al la fremdlingvaj firmoj, kun kiuj ĝi estas en komerca rilato la postulon, ke en la reciproka korespondado oni uzu lingvon boheman aŭ esperanton. Kelkaj firmoj respondis, ke estas por ili malfacile korespondi boheme, dume esperanto estas sufiĉe facile enkondukebla. — Aliaj firmoj en Plzeň mendas komercaĵojn de fremdlingvaj firmoj per esperante skribitaj leteroj, al kiuj ili aldonas adreson de la loka delegito de U. E. A., kiu volonte tradukas la tekston de la mendletero. — Ambaŭ metodojn ni rekomendas al niaj komercistoj por la postmilita tempo.

Esperanto en Ĥinuĵo. La nacia universitato en Pe-king akceptis esperanton en sian programon. La prelegojn pri ĝi partoprenas pli ol 300 studentoj.

(El Züricher Zeitung.)

Nova paŝo! Al soldatoj kaj maristoj permesis la portugala ministerio por militkaj maraferoj porti esperantajn insignojn. — Antaŭ la milito petis Esperantista klubo en Plzeň permeson por siaj membroj-fervojistoj, ke ili povu porti la esperantan insignon sur la uniformo, sed la fervoja ministerio malaprobis ĉi tiun postulon.

Reforma febro. La admirinda verko de doktoro Zamenhof, ne lasas trankvile dormi diversajn superhomojn, kiuj kredas, ke ili estas kreitaj por reformi la mondon. Al esperantistoj, kiuj pensas simple logike, la verko de Zamenhof plene sufiĉas kaj ili estas por la nuna tempo kontraŭ ĉiu ŝanĝo de la fundamentaj reguloj de esperanta gramatiko, ĉar similaj ŝanĝoj grave malutilus al la ideo de la lingvo internacia. Al la veraj amikoj de tiu ĉi ideo tute sufiĉas fundamenta esperanto, sed la superhomoj obstine deziras »reformojn«. Kaj ne nur deziras, ili efektive »reformas« esperanton — ĉiu laŭ sia plaĉo kaj kapablo. La superhoma societo kun senlima garantio, kiu naskis »Idon« montris vojon al aliaj superhomoj, kiuj kredas sin sufiĉe saĝaj por memstare »plibeligis« la verkon de Zamenhof. Jam en kelkaj landoj prezentis diversaj superhomoj sian »reformitan esperanton« kaj memkomprene inter ĉi tiuj landoj ne povas manki Germanujo, kie vivas superhomo Fritz Stephan. Tiu ĉi sinjoro estis iam prezidanto de la Esperantista klubo en Leipzig, sed post

kiam li trovis en si la superhoman potencon, li komencis reformi esperanton. Pri lia agado ni kelkefoje legis en Germ. Esperantisto, sed tiu ĉi nur malmulte nin interesis. Sed nun ni sciigas, ke tiu ĉi sinjoro estas pli vigla, ol ni kredis: Nia kunlaboranto so. Kudela el Olomouc sciigis nin, ke so. Stephan dissendis al liaj kursanoj presajojn pri sia »reformita« esperanto. Do so. Stephan interhomo, Germanujo por li de aŭstria superhomo, Germanujo por li jam ne sufiĉas.

El Hungarlando. De la 13.—18. aprilo t. j. okazis en Budapeŝt filatelia kaj esperanta ekspozicio. Ĝi havis propran poŝtoficejon, kiu izis stampilon kun vorto »Esperanto«. — En la sama hungarlanda ĉefurbo daŭras »Militekspozicio de ĉefduko Jozefo«, kiu enhavas specialan parton f) »Esperanto en la milito«. (Militkoŝtkartoj, leteroj de kaptitoj, manifestoj, statistiko, landkartoj, laboro de U. E. A. dum la milito k. t. p.) La katalogo pri la ekspozicio enhavas artikolon pri esperanto dum la milito, priskribon de la esp. parto de la ekspozicio kaj sur du paĝoj esperantan tekston kun klarigoj por fremduloj. Prezo 2.— K. Informojn petu de: Hadikiallitás, Budapeŝt IV., Kosúth Lajos u. 3).

Peto: Kiu povas vendi aŭ prunti gaz. Esperanto (Genevo) jark. 1915 kaj 1916, bonvolu skribi al la red. de la Progreso.

Enterigo de Dro. Zamenhof sur bildoj. 10 scenojn el la funebra ceremonio: parolon de Antonio Grabovski, Dro. S. Poznanski, majoro Neubarth, tombon de Zamenhof k. t. p. montras la 10 fotografiaĵoj, kiujn eldonis So. Adolf Oberrotmann, Warszawa, Krakauer Vorst. 10. Prezo de la 10 bildoj estas 4.50 M. afrankite. 110 m longa filmo biografia kosta 150 M.

Esperanto en Saksujo. Laŭ la al ni sendita sciigo enkondukis la saksan registaro instruadon de esperanto en la altajn lernejojn.

Esperanto v. Ĉiĉe. Národní universita v Pekingu prijala esperanto do svého programu. Přednášek o něm se účastní přes 300 studentů. (Z »Zür. Ztg.«)

Nový krok! Portugalské ministerstvo války a námořnictví dovolilo všem příslušníkům armády nositi esperantský odznak. — Před válkou žádal Klub esperantistů v Plzni, aby bylo jeho členům železničním zřízencům dovoleno nositi znak esperantský na služební uniformě, ale naše ministerstvo železnic tuto žádost odmítlo.

Esperanto v Sasku. Jak se dovídáme, zavedla saská vláda vyučování esperanta do všech vysokých škol.

Z Uher. Od 13. do 18. dubna byla v Budapešti pořádána filatelská a esperantská výstava. Měla vlastní poštovní úřad, jenž užíval razítka se slovem »Esperanto«. — V témže městě trvá »Válečná výstava arcivévodvy Josefa«, která obsahuje zvláštní oddělení »Esperanto ve válce« (dopisnice, dopisy zajatců, manifesty, statistika, mapy, válečná práce svět. svazu U. E. A., vládní esp. tiskoviny atd.). Výstavní katalog obsahuje článek o esperantu za války, popis esp. výstavní části a na dvou stranách esper. text s vysvětlivkami pro cince.

KRONIKO.

Praha. Nelacigebla kaj meritplena Fraulina rondeto esp. aranĝis komune kun la Esper. Klubo kaj Esper. Societo brile aranĝitan fest-vesperon, per kiu oni memoris la morton de Dro. Zamenhof. Tiu ĉi vespero helpis al la konkordiĝo de la esperantistoj en Praha tiom, ke oni ne plu dubas pri la kuniĝo de ambaŭ bohemiaj esp. centroj. La fervoro de la Fraulina rondeto, precipe de ĝia gvidantino fino. Šupichová, meritas aprobon de ĉiuj bohemiaj esperantistoj.

Plzeň. Esperantista klubo aranĝis la 23. marton sian XIII. ĝeneralan kunvenon, kiu elektis jenan komitaton: son. Petr Novohradský, super. imp. admin. por prezidando, sojn. B. Tittl, sekretario, Fr. Fikrle, vicprezid., Ing. Gros, kasisto, Al. Loukotá, bibliotekisto, Fr. Erhard, protokolisto, Fr. Šnábl, arĥivisto, Em. Kubásek, revuisto. La ĝenerala kunveno unuanime akceptis jenan deklaron, proponitan de so. Tittl: »La XIII. ĝenerala kunveno de la Esperantista klubo en Plzeň ĝoje bonvenas la deklaron de la Esperantista klubo en Praha, celantan la unuiĝon de la bohemia esperantistaro kaj petas sian komitaton, ke ĝi ĉiuforte helpu la akcelon de tiu ĉi unuiĝo. Oni ne povas aprobi la proponon, ke la unueco estu interkonsentita por iu limigita tempo, sed kontraŭe estas nepre necese, ke la paciĝo estu daŭra, malebliganta la devenon de kiu ajn alja malpaciĝo. Tial kuniĝu la nun ekzistantaj du unuiĝoj en kunu komunan centron. — La membraro de la Esperantista klubo en Plzeň esperas, ke la konferenco, kiu traktos pri tiu ĉi temo, solvos kun absoluta senpartieco la demandon pri nia koncentriĝo.«

Olomouc. Kurso en monafinejo de Urzulinoj, gvidata de so. Kudela tre bone progresas.

Neustift ap. Olomouc. La 2. de aprilo malfermis so. Kudela en monafinejo de Franciskaninoj esp. kurson por instruistinoj de orfinlernejo. La estrino kun naŭ instruistinoj lernas tre diligente nian lingvon. Ŝia estrina moŝto meritas dankon por la permeso de kursaranĝo.

Hodolany ap. Olomouc. La 2. marton komenciĝis en la komerca lernejo esp. kurso por 30 lernantoj. La kurson gvidas so. ing. Leop. Berger.

Bohema Esperanto-Servo (ing. L. Berger) en Hodolany ap. Olomouc kolektas adresojn de la personoj, kiuj deziras korespondi. La interesuloj turnu vin laŭ la citita adreso aldonante poŝmarkon por respondo.

Wien. Instruista societo esp. aranĝis la 14. de aprilo en la fizikejo de »Neue Wiener Handelsakademie«, Wien VIII., okaze de la datrevena tago de la morto de Dro. Zamenhof solenan kunvenon, dum kiu parolis prof. Simon pri la mortinto. Dum la poste sekvinta riĉa programo parolis so. Pech el Plzeň pri belajoj de Bohemujo. Lian paroladon akompanis 150 lumbildoj. — »Erster Wiener Esperanto-Verein«, kiu dum la pasinta vintra sezono aranĝis ĉiumonate poresperantajn kunvenojn, vizititajn de multnombra publiko, meritas dankon por sia serioza laboro. La vienaj esperantistoj esperas, ke la Unuiĝo surprizos ilin en venonta sezono per nova sukcesa agado.

BIBLIOGRAFIO.

Juliusz Kriss: Melodioj de l' nokto. Belaspekta 32 paĝa broŝuro 18 × 13 cm enhavanta 11 originalajn kaj 8 tradukitajn poemojn. Nia literaturo ĝis nun posedas nur malmultajn tiom rekomendindajn verketojn, kiel estas la broŝuro de so. Kriss. Multaj el tie ĉi prezentitaj poemoj atestas delikatan sentemon de la aŭtoro. Stilo de ĉiuj poemoj estas klara, ritmo bona, kvankam jen kaj tie ne tute regula. — Prezo de tiu ĉi verketo ne estas alta — ĝi kostas 1.— K kaj estas aĉetebla ĉe la aŭtoro (Kraków, Str. Czysza 8). Ĉiu amanto de poezio aĉetu ĝin!

Nienkamp kaj Schenkel: Dr. Zamenhof der Schöpfer des Esperanto. (Dulingva biblioteko, no. 1.) Broŝuro 11 × 15 cm, 32 paĝa eldonita de Esperanto-Verlag Ader & Borel, Dresden. Verketo kun germana kaj esperanta tekstoj en bona stilo priskribanta historion de Esperanto kaj la karakteron de Dro. Zamenhof. La broŝuron oni povas rekomendi al ĉiuj esperantistoj, ĉar ĝi enhavas kelkajn fragmentojn, kiuj interesos eĉ malnovajn samideanojn. — Prezo ne estas montrita.

Esperantista Voĉo. Organo de Societo Esperanto en Kraków. Responda redaktoro J. Orzech. Kvarpaĝa bulteno 16 × 24 cm. Aperas monate. — Niaj polaj amikoj ankaŭ aperigis sian propran organon kaj en la intereso de nia komuna afero ni al ili deziras, ke ilia bulteno forte subtenu ilian laboron. En la 1. no. diras la redakcio, ke la bulteno volas fariĝi »fajrujo (fokuso?) en kiun alfluus ĉiufankaj sciigoj kaj pensoj, kaj de kie elradiamus la esperanta vorto ĉiudirekten.« Do, la intenco de la redakcio estas tre laŭdinda, laŭdinda tiom pli, ke »la gazeto modestan portas veston« — keil la redakcio mem diras. Mirinde estas, ke la bulteno estas presita sen esperantaj supersignoj. Anstataŭ ilin oni uzis en la unua numero la literon »h« kaj en la dua numero apostrofon »'«, kio pikas la okulojn de ĉiu esperantisto. Ĉu en la kongresurbo Kraków ne ekzistas presejo posedanda esperantajn tipojn? — La abonprezo estas tro alta: 6.— K jare.

Dro W. Wunsch: Pri la elektra aktiveco de nia korpo. Broŝuro 32 paĝa 14 × 10 cm eldonita de Esperanto-Verlag Fried. Ellersiek, Berlin S. 59. Prezo 50 fenigoj. Tekstoj germana kaj esperanta. La aŭtoro preparolas en sia tre interesa verketo la bezonojn de la homa korpo kaj la elektrecon de la homa nervsistemo. Kvankam la verketo estas scienca, tamen ĝia klara stilo permesas al ĉiu laiko facile konatigi kun interesaj ecoj kaj kapabloj de la homa korpo. La legadon kaj zorgan trastudon de tiu ĉi broŝuro ni rekomendas al ĉiu, kiu volas klerigi.

ALLOGO.

A: »Kien vi hodiaŭ volas de ni tiel rapide foriri, mia amiko?«

B: »Hejmen, mia edzino aranĝan por siaj amikinoj kafan posttagmezon.«

A: Pardonu, mi pensas, ke tiuj ĉi ne povas tamen logi vin.«

B: »Jes, certe ili ne logas min, sed la malofta okazo, ricevi bonan kafon.«

Fraha.

JULIE ŠUPICHOVÁ:

ANGULETO POR KOMENCANTOJ.

Antaŭparolo.

Jam pli ol 30 jaroj pasis de la tempo, kiam Dro. Zamenhof modeste kaj preskaŭ timeme eldonis sian unuan lernolibron. Malgraŭ la ŝelkfoje malfavora sorto, Esperanto iris sian vojon senĉese akirante kaj kunligante novajn adeptojn en la tuta mondo.

Sed kiel la vivanta organismo bezonas nutraĵon por fortigi sin, tiel la libroj estis necesaj al la plimultiĝanta samideanaro. Kaj ili — post la eldono de la unuaj naciaj lernolibroj — tuj aperis kaj hodiaŭ estas vere jam malfacite koni ĉiujn verkojn de nia esperanta literaturo — —

Mi opinas, ke estos superflue rekomendi la imitindan verkaron de nia mortinta Majstro, sed tamen mi admonas — precipe niajn komencantojn — al tre ofta kaj zorgemo legado de tiuj ĉi lingvaj trezoroj, kiuj, se ni atente strastudas ilin, pliriĉigas niajn sciojn laŭ gramatika eĉ stila vidpunktoj.

Kaj ĉi tie, en nia »Anguleto por komencantoj,« ni uzu por nia ekzercado plej unue la vortojn de nia kara Senmortulo.

Do: atente kaj laute tra legu, traduku, trastudu, notu kaj imitu!

1a fragmento.

El parolado de Dro. L. L. Zamenhof en la 1a kongreso en Boulogne s. M. 1905.

»...Sankta estas por ni la hodiaŭa tago. Modesta estas nia kunveno; la mondo ekstera

ne multe scias pri ĝi. kaj la vortoj, kiuj estas parolataj en nia kunveno, ne flugos telegrafe al ĉiuj urboj kaj urbetoj de la mondo... Tra la aero flugas misteraj fantomoj; la okuloj ilin ne vidas, sed la animo ilin sentas: ili estas imagoj de tempo estonta, de tempo tute nova...»

Respondu:

1. Kia estas la tago?
2. Kiu tago estas sankta?
3. Por kiu ĝi estas sankta?
4. Kia estas la kunveno?
5. Kiu kunvenis?
6. Kio?
7. Ĉu la mondo scias pri ĝi?
8. Kiel ni parolas?
9. Kiaj estas la vortoj?
10. Ĉu ili flugos al ĉiuj urboj?
11. Ĉu al la urbetoj?
12. Kio ŝajnas flugi tra la aero?
13. Ĉu oni povas vidi la fantomojn?
14. Ĉu ni ilin sentas?
15. Kion ili imagas?

SCIIGOJ.

De la redakcio: Nia redakcia korespondado estas tiel riĉa, ke ne ĉiam estas eble al ĉiu korespondanto tuj respondi. Tial la eventualan malfruigon oni bonvolu al ni pardoni. — Niaj legantoj, bonvolu nin ĉiam tuj informi pri la esperantaj okazintaĵoj en via loko! — Sen poetaj kapabloj ne traduku kaj ne verku poemojn!

De la administracio: Se Vi ne intencas aboni La Progreson, tiam ĝin tuj resendu! La 5./6. kajeron ni sendos nur al la abonintoj. — Ne forgesu, ke la devo de ĉiu vera esperantisto estas subteni la esp. gazeton de sia nacio!

MATEO,

alie nomata paragvaja teo estas la sola efektive valora anstataŭaĵo por kafo kaj hina teo. Ĝi enhavas 1% da kafeino, efikas refreŝige eĉ kurace. Pura naturaĵo antaŭ la milito rekte importata el Ameriko pere de Esperanto.

Tre taŭga por ĉiutaga trinkado.

Paketojn po 3.— K poŝte ĉien ekspedas kaj pli detalajn klarigojn donas

BOHEMA ESPERANTO-SERVO

(inĝ. L. Berger)

Olomouc-Hodolany (Moravio).

Eksiĝo. Fraŭlino Julie Šupichová el Praha eksiĝis de la redakcia membreco de nia gazeto. Tamen ŝi restos nia kunlaborantino.

En Polujon! So. Abram Hendeles en Lodz, Podrzeczna 10. estas rajtigika akceptadi abonon por nia gazeto en Polujo.

DANKESPRIMO.

Al la gesamideanoj en Vieno! Dum mia vizito en la glora metropolo de Aŭstrio mi estis surprizita per zorgoplena aranĝo okaze de mia parolado »Belajoj de Bohemujo« en Neue Handelsakademie. Por la gastemo, kiu min tre surprizis mi esprimas koran dankon al ĉiuj ĉeestantoj. Specialan dankon por ilia afableco mi esprimas al soj. Dir. Schamaneck, prof. Simon, Müller k. a. Ankaŭ mi kore dankas al Turistoj esper. por iliaj zorgoj kaj mia gvidado tra Vieno. La momentoj tie travivitaj restos por mi neforgeseblaj.

Josef Pech.

KVITANCO.

La aperadon de La Progreso ebligis jenaj gesinjoroj: Fino. Julie Šupichová K 20.—, so. Rud. Hromada K 10.—, fo. M. Moudrá K 10.—, (ĉiuj el Praha) sino A. Hrdinová, K 10.—, (el Příbram) Labor. gimnast. societo, Plzeň V. K 30.—, soj.: Novák Fr., Pech Jos., Přibáň Jan, Beneš Bl., Chmelík Al., Šibřina Fr., Fořt V., Jirovec Jos., Bureš Jan, Loukota Fr., Rojt Jiří, Havel Ant., Flégr, Brabec Stan., Kepl Pav., Pech V., foj.: Melková Kat., Glaserová M., (ĉiuj po K 10.—) so. Kříž Jos., kaj fo. Kliková B. K 10.—, Esperantista Klubo K 150.—, ĉefing. Novák Rud., K 100.—, geedzoj Brožík K 60.—, Zikan Fr., K 10.—, Krieglstejn K., K 10.—, Horák Jos., K 10.—, fo. Vlčková Heda K 10.—, ĉiuj el Plzeň. (Daurigo.)

Belajn vidaĵkartojn

de reĝa urbo Plzeň ĵus eldonis

JAN PAVLÍK, papervendejo en Plzeň.

Ĉasistoj! Plumbo-globetojn

povas al si ĉiu facile fabriki per mia globetilo, kiun mi liveras en du, laŭplaĉe dezirataj globdimensoj kaj sendas kompletan globetilon remburse je 40 kronoj. Por la perfekta rondeco de globetoj, oni premas plenan garantion.

H. MORÁVEK, Plzeň, Sřelnice.

Eldonanto: Esperantista klubo en Plzeň. — Responda redaktoro: B. Tittl, Plzeň, Radyňská ul. Presis: Laborista presejo, Plzeň.